
ISSN 1381-2939

# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



# Inter la realo kaj la fikcio

**Ret-enkete pri Kontakto**

**Islanda vulkano ne haltigas la Estraron**

**Ĉu filmoj en Esperanto?**

*numero 140 (2010:2); jaro 28*

# *saluton!*



*Karegaj legantoj,*

*en tiu ĉi numero vi legos kelkajn raportojn pri la agado de la TEJO-estraro por iom plibonigi vian movademan vivon: ampleksa raporto rilate al reta enketo pri Kontakto kaj etampleksa raporto pri la lasta estrarkunsido kiu okazis printempe en Roterdamo, Nederlando, malgraŭ la cindra nubego de la islanda vulkano Eyjafjallajökull (Sergeo TYRIN bele prononcis "ej ja fi al la okul'", sed proksimuma prononco ja estas: EjafjAtlajÖkütl). Rilate al tiu ĉi vulkano, cetere, la redakcio malkulpas pri ajna respondeco :-).*

*Nepre legu ankaŭ la aliajn artikolojn, sendube pli kulturajn ol movadajn, sed kredeble ja interesajn por la legantaro de TT (ĉio recenzita aĉeteblas ĉe la UEA-katalogo!).*

*Kaj ne forgesu ŝati nian paĝon en Facebook kaŭ aldoni nin al viaj Twitter-kontaktoj!*

*Nicola*

*Enhavo*


SES 2010......................................3
Ret-enkete pri Kontakto................4
Eĉ pro vulkano ne haltas TEJO-estraro...........................................7
Ĉu filmoj en Esperanto estas utopio?..........................................9
Komitato de TEJO (2010-2012)...........................................12
Skoltoj relevas la flagon..........................................12
"Lupo Alberto" kaj "Lasta lekcio en Gotingeno"...................................13
La Ludo de la Nuda Vero............14
Eterne Rima................................15



*TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.*

*Kontribuaĵojn sendu rete al **tejo-tutmonde@tejo.org** (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola RUGGIERO), Bræðraborgarstígur 55, 101 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuaĵoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

*Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.*

*Redaktisto: **Nicola RUGGIERO** (Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***



ĜD Edukado kaj kulturo

Programo "Junularo en Agado"

***Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.***

# SES 2010

de Vilfredo HUGHES

Per la afabla subteno de NoJEF (Norwich Jubilee Esperanta Fondaĵo), mi partoprenis en SES en Slovakujo. Ĝi estis mia unua internacia esperanta renkontiĝo, tial mi ne sciis, kion mi devus antaŭvidi.

Ĉe la komenco mi renkontis kelkajn homojn (ambaŭ SESanoj kaj neSESanoj) kaj klare vidis ke lingvaj problemoj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ. Feliĉe, dum la lastaj tagoj mi aŭdis unu el ili ekspliki ke li estis komencanto en Esperanto.

La ĉefa celo de SES estis kompreneble studado. Mi lernis multegon kaj la instruado estis ĉiam bonega. Anstataŭ memstudado oni havis klasojn kun tre spertaj geinstruistoj, kaj la geinstruistoj elektis la temojn. Tial mi malkovris multajn subtilaĵojn de la gramatiko de Esperanto, kiujn mi tute preterpasis antaŭe. La gramatiko estas pli komplika ol mi unue supozis sed per SES mi konkludis ke alta nivelo de Esperanto estas tute atingebla. Antaŭe mi fojfoje dubis tion.
Krom lernado, estis ekskursoj al multaj lokoj, prelegoj, koncertoj kaj eĉ teatraĵo. Ofte oni ne povis elekti tion, kion oni plej volis fari ĉar novuloj kiel mi volis fari ĉion. Ekzemple, mi neniam ĉeestis internacian vesperon antaŭe. Miaj plispertaj amikoj diris, ke normale ĝi temas nur pri kantoj kaj prezentoj kaj tial mi decidis aldoni min. Mi faris mallongan demonstradon da jojoumado (trukoj per jojo), kiu vere defiis mian tradukan kapablon.



SES ankaŭ estis la unua fojo, kiam mi faris longajn konversaciojn Esperante. Nur ĉe esperantistaj renkontiĝoj oni flustris Esperanton dum lecionoj, kriis Esperanton en la dancejo kaj eĉ kantis Esperanton kun multaj aliaj. Mi kalkulis, ke mi parolis malpli ol kvin horojn en la angla dum la tuta evento! Ĉe la fino mi estis kiel "pura esperantisto", ĉar mia anglalingva vortstoko forflugis! Estis tre stranga afero.

Homoj ĉe internaciaj eventoj estas tre babilemaj kaj afablaj. Mi facile amikiĝis al homoj el multaj landoj. Iam tio ŝajnas al mi strange, ke mi babilis kun esperantistoj sen koni iliajn hejmlandojn. La neŭtraleco de Esperanto ja funkcias, sed oni ne ĉiam vidas tion ĉe lokaj eventoj. Per la homoj kiujn mi renkontis, mi ĝuis multon, lernis multon kaj ankaŭ plikuraĝiĝis pri lingvolernado ĝenerale — preskaŭ ĉiu povis aligatori bone.
Do, mi amis SES-n. Se vi volas plibonigi vian sciadon de Esperanto, aŭ simple ne jam estas sufiĉe memfida por ĉeesti aliajn esperantajn renkontiĝojn, venu al SES!


# Ret-enkete pri Kontakto

de TEJO-Estraro

Jen eta prezento de la rezultoj rilate al reta enketo pri Kontakto, kiu estis malfermita inter la 15a de decembro kaj la 31a de januaro. Ĝi ne celas prezenti ĉion (tio ne eblus), sed la plej interesajn rezultojn. 134 homoj bonvole donis sian opinion pri la revuo tra tiu enketo. Ĝi estos tre valora kaj por la redaktoro de Kontakto kaj por TEJO mem. Pasintece jam okazis plurfoje tia enketo, kiel en 1986, sed komparo estus iom malfacila, ĉar la enketo ne estis konstruita laŭ antaŭaj modeloj, kaj kontaktmanieroj estis malsamaj (tiam respondon oni ricevis perpoŝte).

***Ĝeneralaj informoj:***

La averaĝa aĝo de la respondintoj estas proksimume 38 jaroj (inter 17 kaj 87 jaroj), kaj 50% situas inter 25 kaj 50 jaroj. Kompreneble, tiel estas ĉar ne nur la membroj de TEJO respondis (64), sed ankaŭ abonantoj (34), patronoj (11), kaj aliaj legantoj (ekzemple, samfamiliano de membro). Averaĝe regulaj ricevantoj ricevis ĝin dum 7 jaroj.




Brazilo estas la plej reprezentata lando, kun 16 respondantoj. Sekvas Francio (13), Germanio (11), Pollando, Rusio (8), Nederlando, Israelo (7), Usono kaj Finnlando (6). Multe pli da respondantoj estas viroj (99 kontraŭ 31). Plejmulto de la respondantoj konsideras sin sperta en Esperanto (79) aŭ meznivela (45).


Rilate al reprezenteco de la enketo, ĝi povas esti konsiderata globale bona spegulo de la legantoj de Kontakto. La relativa nombro da membroj kaj abonantoj estas trafe pli-malpli la sama ol realeco. La nombro de virinoj kompare al viroj estas ja malalta, sed ne tiom surprizas, ĉar jam la nombro de inaj membroj de TEJO kaj UEA estas malalta (inter 30 kaj 40 elcentoj de la tuto). Geografie, oni povus esperi pli da respondoj el Germanio, kaj Rusio, kompare al kontribuoj el Francio, Brazilo kaj Pollando. La proporcio de israelanoj, hispanoj, kaj finnoj estas ankaŭ mirindeta. Tamen estas maltro da respondoj por povi korekti.


Eble la plej surpriza povus esti la aĝo, sed ĝi fakte ankaŭ bone spegulas la veran "popolon" da legantoj de Kontakto. Logike, la abonantoj de Kontakto estas ĝenerale homoj kiuj ne plu estas en la necesa aĝo por ricevi ĝin per la UEA-membreco. Tial la averaĝa aĝo de abonantoj estas ĉirkaŭ 60 jaroj. Plie, TEJO havas 59 patronojn kiuj ankaŭ ricevas la revuon, kies meznombra aĝo superas la TEJO-aĝon.

***Akiro***

Al la demando "ĉu vi abonus Kontakton se ĝi ne estus parto de TEJO-Membreco", 41

respondis "jes", kaj 30 "certe". 40 respondis ke "verŝajne ne sed ili tamen ŝatas ricevi", kaj 11 respondis "ne". Oni do konkludas ke plejmulto de la ricevantoj ŝatas ricevi ĝin. Tamen se oni limigas la pristudon de la rezultoj al nur membroj, patronoj, kaj honoraj membroj, la proporcio de "Jes ja" falas. La kialo estas ke multe el tiuj respondintoj logike estis abonantoj.








Pli multo de la legantoj preferas ke plu aperu papera versio, 92 homoj preferis ĝin, kontraŭ 25 por la PDF.

***Enhavo***


47 el la respondantoj ŝatas la koncepton de la ĉeftemo po revuo, kontraŭ 21 malŝatantoj. Tamen plimulte elektis "ambaŭ". Tre klare la plejmulto de la respondantoj konsentas kun apero de "facilaj" artikoloj. Pli ol 80 elcentoj preferas la daŭran ĉeeston de tiaj artikoloj. Koncerne la movadecon de Kontakto, la plej granda nombro ne estus ĝenita pro apero de movadaj artikoloj (55) kaj 40 respondintoj konsideras ke malmovadeco de Kontakto estas grava eco. 25 homoj klare preferus aperon de movadecaj artikoloj.

La plej preferataj temoj estas lingvoj, tutmondaj problemoj, mitoj, vojaĝoj, kaj humuraĵoj. La plej malŝatata temo estas sporto.




***Opinioj pri la revuo***

La respondintoj taksis kelkajn ecojn de Kontakto. Bedaŭrinde estis erareto en la eblaj elektoj kiuj estis iomete konfuzigaj, tial oni ne povas tute fidi je la rezulto. Tamen tute klaras ke la lingvo-nivelo de la revuo estas kontentiga por plejmulto de la enketitoj. La juneco ankaŭ estas laŭ la respondintoj trafa eco de la revuo, sekvita




de la kvalito. Konklude, la ĉefaj perfektindaj ecoj de Kontakto estus la grafikaj aspektoj, la kvanto de artikoloj, ĝiaj temoj kaj la aperritmo.

Sufiĉe multaj ne konas Kontakton ekde sufiĉe da tempo (42 respondintoj). La aliaj globale opinias ke Kontakto ne estis pli bona antaŭe. (32 kontraŭ 25).

La leganto prefere legas ĉion (20) aŭ preskaŭ ĉion (36), kontraŭ 21 kiu legas "1 aŭ 2 artikolojn". Tamen la plejmulto de la respondintoj legas multe se plaĉas al ili la temo.


Ne necesas prezenti la pritakson de la unuopaj numeroj 1 ĝis 5 de 2009, simple ĉar la meznombraj rezultoj tre proksimas (statistike). Por la enhavo, meznombre la rezultoj troviĝas inter 3,63 (enhavo de "kiel obeigi la fajron") kaj 3,91 (enhavo de "Malgrandaj etnoj"). Por la kovrilo, estas inter 3,63 (kovrilo de "Malgrandaj etnoj") kaj 3,87 (kovrilo de "Kiel obeigi la fajron").


La celo de tiu demando estis malkovri kian revuon la legantoj plej ŝatas, sed evidentiĝas ke el la revuoj aperintaj en 2009 ne estis unu pli elstara ol aliaj, tial oni nenion povas konkludi.

***Kontribuo***

El la respondintoj, 29 jam verkis por kontakto, kaj 3 nuntempe verkas. Laŭ la rezultoj, ne evidentiĝas ke la verkantoj aŭ verkintoj havas meznombre pli altan lingvonivelon ol aliaj. La plej oftaj citataj kialoj pro ne-verko estas ĉefe la manko de tempo, sekvata de la malemo, la lingvokapablo kaj la kapablo.

Viaj kritikoj, komentoj, sugestoj tre bonvenas.



# Eĉ pro vulkano ne haltas TEJO-estraro

*raportas Paulína KOŽUCHOVÁ*

La printempa kunveno de la TEJO-estraro okazis inter la 23a kaj 25a de aprilo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando. La fakto ke la kunveno okazis ĝuste en la CO signifis por ni gravan avantaĝon: ni povis kunsidi ankaŭ kun kelkaj reprezentantoj de UEA. Bonŝance ĉiuj estraranoj sukcesis atingi la kunsidejon malgraŭ la nubo de vulkana cindro kiu tiutempe grave endanĝerigis la okazigon de la aranĝo. Ĝenerale, la Estraro havis tre plenan kaj okupitan, sed fruktodonan kaj agrablan kunvenon.

Jen la ĉefaj punktoj kiujn ni traktis:

***IJK 2010***

Kiel oni scias, la ĉi jara IJK okazos en Kubo. TEJO jam ekde la elekto de tiu ĉi loko strebas havi kontakton kun la LKK kaj subteni ĝin laŭeble. Ni konscias, ke la situacio en Kubo estas iom defia kaj aparta kompare al la eŭropaj IJK-j, interalie ĉar neniu el la LKK-anoj havas sperton kun organizado de similaj aranĝoj kaj ĉar kontakto kun ili estas limigita pro manko de interretaliro. TEJO do decidis sendi al Kubo spertulon – nome Łukasz Żebrowski, la estraranon pri IJK – kiu subtenos kaj helpos la LKK-n tuj antaŭ kaj dum la IJK. Krome li reprezentos TEJO-n ankaŭ en la UK kaj ILEI-seminario, kiuj okazos antaŭ la IJK. La estraranoj ankaŭ diskutis informon de la LKK pri ŝanĝo de kongresejo al apuda kampadejo, kiu tamen ŝajnas esti taŭga loko.

***Rilatoj kun UEA***

Dum la Estrarkunveno estis aparta sesio dediĉita al diskuto kun reprezentantoj de UEA: ĉeestis ĝin Osmo Buller, ĝenerala direktoro de la CO, kaj Loes Demmendaal, estrarano de UEA pri TEJO. Oni pridiskutis ĉefe strategiojn por vigligi la Komitaton kaj planojn rilate la publikaĵojn Kontakto kaj TEJO-Tutmonde.

***Pasporta Servo***

La Pasporta Servo trairis tre grandan evoluon ene de la lasta tempo, sed la procedo ankoraŭ ne estas finita – ni konscias ke la renovigita Pasporta Servo ne estas perfekta kaj ni do daŭre grade plibonigas ĝin. Dum ĉi tiu kunveno ni diskutis liston de pluraj ŝanĝindaj detaloj. Okazis eĉ aparta sesio konsistanta el videobabilado kun nia nova programisto, Daniel Bebelacqua el Urugvajo, kiu prizorgos la retejon. Krome, ni decidis plibeligi ankaŭ la grafikan aspekton de la retejo.

***Kontakto***

Ni daŭrigas paŝojn por renovigo de Kontakto – ni preparis bazon el konceptoj kaj postuloj por la renovigata revuo kaj alvokon kandidatiĝi kiel ĝia redaktoro, kun la limdato de 15a de junio. Sekve ni intervjuos la kandidatojn kaj elektos la plej bonan.

***TEJO-Tutmonde***
Jam de kelka tempo ni konscias ke nia oficiala organo ne estas tiel efika informilo kiel bezonatus – ĉefe ĉar pro ĝia aperritmo la artikoloj en ĝi estas ofte neaktualaj. Rezulte, la Estraro venis al la konkludo ke plej bone estos ekde la venonta jaro nuligi ĝin en ĝia nuna formo. Sed ne timu – ni bone kompensos tiun mankon, uzante aliajn, pli efikajn informkanalojn por liveri al nia membraro ĉiujn necesajn kaj interesajn novaĵojn pri TEJO kaj ĝiaj aktivaĵoj.

***TEJO-oficisto***
Oni denove priparolis la ideon dungi TEJO-oficiston, kiu laborus en la CO kaj transprenus taskojn por kiuj volontulo kaj estraranoj apenaŭ sufiĉas. Baldaŭ oni alvokos kandidatiĝi por la posteno.




## Hanojo bonvenigas vin por la Komuna Semajno!

Tiuj kiuj volas viziti Vjetnamion, ni elkore invitas vin al KS, kiu okazos inter la $18^{a}$ kaj la $20^{a}$ de decembro 2010 en Hanojo, Vjetnamio.

Samtempe okazos la jubileo de la miljaraĝa malnova citadelo Thang Long (kiu nun estas Hanojo – ĉefurbo de Vjetnamio). Ankaŭ okazos Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2012. Vi ne nur povos partopreni en la komuna seminario de aziaj junuloj per Esperanto kun ĉeftemo: "Komunikiloj inter junaj esperantistoj" sed ankaŭ ekskursi, viziti vidindaĵojn kaj tradiciajn vestiĝarojn de Hanojo. En semajnfino vi povos viziti noktan bazaron en centra malnova urbo aŭ spekti surakvan pupteatron kaj fari pliajn mojosajn aferojn. Baldaŭ decembro venos do pensu kaj decidu, ni atendas vin, kaj ni kredas ke vi ne bedaŭros!

Aliĝilo kaj programo troveblas en jenaj retejoj:
**http://www.tejo.org/eo/KS2010**
**http://www.facebook.com/komunaseminario**

# Ĉu filmoj en Esperanto estas utopio?

*de Aleksander OSINCEV, E-instruisto*
*Kunordiganto de Verda Filmejo*
*www.filmoj.net*

Dum prezentadoj de Esperanto, ĉie kie mi organizadis ilin, oni demandadis min, ĉu ekzistas radioj, revuoj aŭ filmoj, aŭ eĉ televido en la internacia lingvo. Laŭ miaj rakontoj pri mirindaj ecoj de Esperanto, en kiuj la lingvo vere aspektis viva kaj uzata de multaj personoj, memkompreneble tuj mi devis prezenti longegan aŭ ne tro longan liston de radiostacioj, revuoj kaj filmoj. Se pri deko da radiostacioj kaj cento da revuoj kaj gazetoj mi ne havis problemojn, pri filmoj tamen mi devis konfesi, ke ekzistas nur kelkaj filmoj, originale produktitaj en Esperanto dum ĝia 123-jara historio, kiujn eblas kalkuli per fingroj de unu mano. Pri malsukceso de E-televido mi prefere silentis.

Esperanto ne estas escepto, ja ekzistas centoj da lingvoj, en kiuj oni ne produktas filmojn, en kiuj oni ne elsendas per radio, en kiuj oni eĉ ne presas revuojn. Sed ĉu tio koncernas la lingvon, kiun parolas, laŭ diversaj kalkulmanieroj, ekde 2 ĝis 10 milionoj da homoj el ducento da landoj, kiuj opinias, ke ekzistas unika internacia E-kulturo?

Kial esperantistoj evitas la plej fortan kaj impresan arton, kiu kunforĝis sonon kaj bildon, teatron kaj literaturon?

La homoj jam delonge perceptas la mondon per bildoj, sed ne per tekstoj. Eble pro tio la eksteruloj ne rimarkas Esperanton, ke ĝi daŭre vivas en tekstoj, sed ne en bildoj.

Mi kolektis kelkajn opiniojn, kiuj, laŭ mia sinteno, bone ilustras la ĝeneralan situacion, kaj kiujn mi skizas sekve:
1. Produktado de filmoj estas multekosta;
2. Malposedo de la parola Esperanto de plejmulto de esperantistoj;
3. Malmultas personoj, kiuj serioze kaj profesie agas per Esperanto kaj produktas ion kulturan;
4. Esperantistoj ne havas originalan kaj taŭgan subjekton aŭ bonan ideon.

Laŭ mia imago kaj kapablo, mi ŝatus espliki ĉiun punkton.

***1. Produktado de filmoj estas multekosta.***

Por krei altkvalitan filmon oni bezonas grandajn financajn rimedojn por pripagi scenariston, reĝisoron, aktorojn, produktadon, muntadon kaj multon alian. Ankoraŭ antaŭ unu jaro mi kredus al tiu aserto. Sed la vivo donas al ni tute aliajn ekzemplojn: la brita amatora reĝisoro Marc Price filmis la filmon "Colin" en 2008 kontraŭ 70 dolaroj per amatora kamerao, la filmo estis alte taksita en la filma festivalo en Cannes. La usona reĝisoro Oren Peli filmis la furoran hororan filmon "Paranormala Aktiveco" (Paranormal Activity) en 2007 per la buĝeto de 15 000 dolaroj, kaj estis filmita

per amatora kamerao, sed la filmo kolektis 190 000 000 dolarojn.

***2. Malposedo de la parola Esperanto de plejmulto de esperantistoj***

Ŝajne temas pri tio, ke estas malfacile trovi aktorojn, kiuj parolus klaran, viglan kaj vivan Esperanton. Mi rekomendus al tiuj personoj, kiu asertas tion, partopreni iun grandan E-aranĝon, por certiĝi, ke ekzistas multege da esperantistoj, kiuj parolas Esperanton kiel gepatran lingvon aŭ eĉ pli bone, ĉar Esperanto devigas paroli klare kaj bele por esti komprenata. Specialan rolon ludas parolmaniero kaj akĉento, sed tio nur aldonas ĝuindan ĉarmon.

Tamen mi povas kompreni la aserton, ĉar averaĝe la parola kapablo de esperantistoj ne aspektas perfekta. Bedaŭrinde, ne ĉiuj havas ĉiutagan praktikon en la parola lingvo. Esperanto daŭre vivas pli en tekstoj, ol en paroloj. Manko de kapablo pri parola lingvo estas kaŭzita ankaŭ de manko de aŭdvidaj materialoj en la internacia lingvo. Unu naskas alian, tio estas dume nedisŝirebla cirklo.

***3. Malmultas personoj, kiuj serioze kaj profesie agas per Esperanto kaj produktas ion kulturan.***

Pli kaj pli mi ricevas impreson, ke eĉ proksimume kalkulita kvanto de esperantoparolantoj, estas tro optimisma. Malmultas personoj, kiuj atingas vere bonan nivelon de la lingva posedo, ankoraŭ malpli multe kreas ion per Esperanto. Tio estas konata fakto ankaŭ por aliaj movadoj, kaj entute por homa aktivado: kreantoj estas malmultaj, konsumantoj estas plejparto. Sed ŝajnas, ke tiu proporcio en kazo de Esperanto aspektas katastrofa el vidpunkto de kreado de kulturo, ja la tuta kvanto de esperantoparolantoj estas malmulta. Do, rezultas, ke ne ĉiuj direktoj de kultura evoluo kaj ne ĉiuj direktoj de aktivado estas aktivaj, ĉar simple mankas homoj por tio. Ekzistas ankaŭ alia aspekto: laŭ sia naturo esperantistoj estas idealistoj, kio naskiĝas el la interna ideo de Esperanto, ili estas revantoj pri pli harmonia kaj justa mondo. Kaj, evidente, por subteni siajn revojn, oni ne bezonas krei ion, ĉar kreado apartenas al la fizika mondo, ne al revoj.

***4. Esperantistoj ne havas originalan kaj taŭgan subjekton aŭ bonan ideon***

Ankaŭ tiun punkton mi opinias vera. Malgraŭ ekzistanta tre riĉa E-literaturo, eĉ originala, ŝajne nenio inspirigas kreemulojn surekranigi E-verkojn. Ŝajne, la "unika E-kulturo, kiun oni nomas internacia" ankaŭ ne inspirigas. Temas ĝuste pri ludfilmoj. La dokumentajn filmojn sukcese faras Roman Dobrzyński. Ekzistas belega informa filmo "Esperanto

**Puŝetu nin en Facebook**
**http://tinyurl.com/TT-en-facebook**

**Sekvu niajn pepojn en Twitter**
**http://tinyurl.com/TT-en-twitter**

estas..." de Rogener Pavinski kaj E@I-skipo.

Mi certe mensogus, se mi prisilentus la fakton de surekranigo de "Gerda malaperis" de Claude Piron kaj "La Patro" laŭ adaptita verko de la japana literaturo de filmo-studio "Imagu-Filmo". Sed tiuj filmoj aspektas pli escepto ol la regulo, ili estas kvazaŭ falanta stelo, kiu aperas bele kaj klare kaj poste malaperas el la horizonto. Mi ĝuis la amatorecon de la filmado kaj esperis pri daŭrigo, sed la miraklo ne daŭris longe. La entrepreno ŝajne ne plu ekzistas kaj ĝia retpaĝo ne funkcias. Mi povas supozi, ke la atendoj pri financaj enspezoj per la filmo estis vanaj.

Mi ne volas kritiki ĉiujn kaj ĉion, sed mi ŝatus peni kompreni la ekzistantan situacion, kompari ĝin kun la situacio en la aliaj landoj kaj en la mondo kaj prezenti tion, kion mi jam vidis kaj spertis, kaj eble veki la intereson de kreemuloj pri agado en grandega tereno de moviĝantaj bildoj.


**Nova provo**

La bezono pri modernaj aŭdvidaj materialoj estas evidenta. Kiel respondo al tiu bezono antaŭ duonjaro kreiĝis iniciata teamo pri dublado de filmoj en Esperanto surbaze de la filma portalo Verda Filmejo, la plej granda kolekto de subtekstoj en Esperanto.

Ankoraŭ fruas paroli pri la rezultoj, sed jam nun ni povas paroli pri tio, ke eblas uzi modernajn objektojn de la aŭdvida internacia kulturo, kiu ĉefe ekzistas sub la licenco de Krea Komunaĵo (Creative Commons) en niaj propraj celoj, kreante proprajn derivaĵojn de tiuj objektoj, ricevante ion novan kaj freŝan.

La malnetojn mi ŝatus prezenti dum IJK-66 en Kubo dum prezento de nia filma agado kaj dum Filmaj vesperoj.

Se vi havas pliajn ideojn pri la temo aŭ ŝatus reagi, mi invitas vin komenti la artikolon ĉe: http://filmoj.net/filma-utopio



# Komitato de TEJO (2010-2012)

La Komitato estas la supra decida organo de TEJO. Ĝi kunvenas kutime dum Internacia Junulara Kongreso en Julio, kaj eble ankoraŭ unufoje ĉirkaŭ la jarŝanĝo. Inter la kunvenoj la Komitato diskutas per dissendolisto. La komitato ankaŭ povas voĉdoni poŝte kaj rete.

**Komitatanoj A (30):**
La Komitatanoj A estas reprezentantoj de la landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO.

*Por Landaj Sekcioj (29):*
Argentino (ArgentEJO) – Gonzalo SIRIO
Brazilo (BEJO) – Rodrigo de Souza CYRINO
Burundio (JEBUO) – Jérémie SABIYUMVA
Ĉeĥio (ĈEJ) – Marek BLAHUŠ
Danio (DEJO) – Jonas DALMOSE
Finnlando (FEJO) – Andrei DUMITRESCU
Flandrio (FLEJA) – Matthias HUMET
Francio (JEFO) – Quentin WEBER-SEBAN
Germanio (GEJ) – Nils Martin KLÜNDER
Germanio (GEJ) – Julia HELL
Hispanio (HEJS) – Manuel Álvaro BERBIS MORENO
Hungario (HEJ) - SMIDÉLIUSZ Petra
Hungario (HEJ) - SZÉKELY Vilté
Irano (IrEJO) – Moĵgan SALMANIZADEH
Israelo (JELI) – Adam (RAIZEN) MEŜA
Italio (IEJ) – Tommaso MANZON
Japanio (JEJ) – OKABE Akiumi
Koreio (KEJ) – SONG Ho-young
Kroatio (KEJA) – Kaja FARSZKY
Nederlando (NEJ) – Nico HUURMAN
Norvegio (NJE) – Einar FAANES
Pollando (PEJ) – Natalia ANTOLAK
Rusio (REJM) – Daŝa OBRAZCOVA
Slovakio (SKEJ) – Zuzana KOŽUCHOVÁ
Svedio (SEJU) – Robin RÖNNLUND
Togolando (JOTE) – GBEGLO Djifa
Ukrainio (ULEJ) – Irina GERASIMOVA
Usono (USEJ) – Darcy ROSS
Vjetnamio (VEJO) – NGUYEN HOANG Yen

*Por Fakaj Sekcioj (1):*
EUROKKA - Alexandre RAYMOND

**Komitatanoj B por la jaroj 2010-2012 (2):**
La komitatanoj B estas elektitaj rekte de la individuaj membroj de TEJO. Ilia maksimuma kvanto dependas de la nombro de individuaj membroj de TEJO.

Guy JOHNSTON (Britio/Pollando)
Michael Boris MANDIROLA (Italio)

**Komitatanoj C (0):**
Momente neniu

La komitatanoj A kaj B povas aldone elekti komitatanojn C.

# Skoltoj relevas la flagon!

Skolta Esperanto Ligo preparas novan strategian agadplanon por memorigi sian 100-jariĝon en 2018. La ligo de Esperanto-parolantaj geskoltoj planas revigligi sian agadon kaj oferi novan programproponon por la skolta movado per la popularigado de diverseco uzante la internacian lingvon. SEL, la plej malnova internacia skolta organizo, planas agi en la kampoj de informado (pri Esperanto en naciaj skoltmedioj ĉi jare), trejnado (trejnseminarioj por novaj aktivuloj en 2011) kaj aplikado (internacia skolta tendaro en 2012).

SEL bezonas geesperantistojn, iamajn aŭ nunajn geskoltojn, kiuj volus kunlabori loke kun naciaj skoltasocioj aŭ internacie ene de SEL.

Se Vi volas scii pli, bonvolu viziti: *http://esperanto.org/skolta* kaj skribi al *SEL.Reaktivigo@gmail.com* por ricevi pliajn informojn.

# "Lupo Alberto" kaj "Lasta lekcio en Gotingeno"

*Du novaj komiksoj esperantigitaj de la itala teamo RoMEo*

*de Daniele Binaghi*

Du italaj komiksoj samtempe esperantigitaj de projekto RoMEo: *Lupo Alberto*, kun la bildstrioj de la helblua lupo el la plej fama bestobieno en Italio, kaj *Lasta lekcio en Gotingeno*, rakonto pri la matematikaj nefinioj. Post la grandaj sukcesoj de Rat-Man kaj Diabolik, daŭras la prezentado de italaj komiksoj al la esperantistoj. Jam pli ol 30 jaroj pasis ekde kiam Silver, la itala Guido Silvestri, inventis tiun, kiu fariĝis la plej fama lupo en la historio de la itala, kaj eble monda, komiksarto; kaj tiom longe daŭris la amrilato inter la helblua Lupo Alberto kaj la kokino Marta, lia stranga kaj ofte freneza amikeco kun Henriko La Talpo, liaj bataloj kun la gardhundo Moseo kaj ĉiuj aliaj amuzaj aventuroj de roluloj riĉaj je personeco kaj tre bone karakterizitaj, kiuj konsistigas malgrandan mikrokosmon de diversa homaro, en kiu la lupo estas eksterulo, vivanta ĉe la rando kaj akceptanta nur parte la regulojn de la grupo kaj pro tio nur parte akceptita de la grupo.




Projekto RoMEo, kune kun Edistudio kaj IEJ kaj, por la unua fojo, la Torina Esperanto Centro, prezentas la unuajn bildstriojn kaj la plej amuzajn rakontojn el la bestobieno en nova 144-paĝa libreto; en ĝi troviĝas ankaŭ iuj "redakciaj" paĝoj por prezenti al la leganto Silver kaj la rolulojn de li kreitajn, kaj du speciale faritaj desegnaĵoj - unu el ili de Silver mem - pri Esperanto kaj la lingvaj problemoj. La komikslibreto jam disponeblos dum la ĉi-someraj UK kaj IJK kaj aliaj esperantistaj renkontiĝoj, kvankam ĝi estos plej verŝajne oficiale prezentita ĉe "Lucca Comics & Games 2010"; krom tie, ĝi estos aĉetebla ĉe Edistudio, IEJ kaj CET.

Sed la ĉi-jaraj eldonoj de projekto RoMEo ne estas nur paperaj. El la oficiala retejo[1] de la projekto jam eblas elŝuti senpage alian bildrakonton: *Lasta lekcio en Gotingeno*. Temas pri aparta komikso, kiu pritraktas apartan temon per aparta metodo, kaj kiun beligas la mirindaj akvareloj de Davide Osenda, aŭtoro ankaŭ de la rakonto. Historio, matematiko kaj filozofio miksiĝas en vojaĝo al la nefinio, kiu ravas la fantazion de ĉiuj legantoj.

Laŭintence, ankaŭ tiu rakonto trovos sian vojon al presado. Sed pro la karakterizoj de la rakonto mem, por tion fari ĝi bezonos sufiĉe da interesiĝintoj kaj aĉetontoj; espereble do la ebleco ĝin legi antaŭe en PDFa formo vekos sufiĉe da intereso.

[1] www.pecorelettriche.it/Esperanto/RoMEo/

# La Ludo de la Nuda Vero

*recenzis Aleks BAUDRY*

Granda novaĵo por esperantistoj! Nova ludo esperantlingva aperis. Nu, ĝi ne estas aparta revoluciaĵo, sed estas sufiĉe malmulte da tabloludoj en Esperantujo kaj pro tio ĝi estas rimarkinda kaj uzinda, ĉefe en porfamiliaj aŭ junularaj aranĝoj, kie ludoj estas foruzataj.

Foje kelkaj tiaj ludoj havas kap-rompajn regulojn, kiel ekzemple "La Koloniantoj de Katano"... Kaj kontraŭe al "La Koloniantoj", tiu ĉi "Ludo de la Nuda Vero" estas aparte simpla. Ĝi estas fakte kartaro, kie skribatas demando po karto, pri kiu vi estu ĉiukaze aŭ favora, aŭ mal-favora, aŭ dubema. Kune kun la demandaj kartoj, estas respondaj kartoj "Jes", "Ne" aŭ "Nu..." kaj ĵokeraj sentekstaj kartoj.




Ankaŭ la reguloj malampleksas, eble tro, fakte. La provizantoj de tiu ludo ofertis regulproponojn, pli ol verajn regulojn, certe ĉar la ludo en si mem permesas multe pli da eblecoj ol kion la kreintoj fakte elpensis. Do verdire, finlegante la regulojn, ne klaras kiel gajni kaj malgajni. Plie, ne estas limo por la nombro da ludantoj. La vera celo de tiu ludo estas fakte babiligi, kaj finfine scii... la Nudan Veron pri viaj kunludantoj!

Tial ĝi estas tutcerte ludo kiu plej plaĉos al spertuloj, kies babiltemo elĉerpiĝis, aŭ ŝatantoj de "ago aŭ vereco" aŭ la fama "ludo de la turnata botelo".
Ĝi nepre skribindas en aĉetlisto de ludemuloj, sed certe evitindas por la kaŝemuloj.

El la demandaro troveblas jen argumentaj jen filozofiaj demandoj aŭ plisimplaj el ĉiutagaj situacioj. Kaj ĉar vi certe ekde la komenco de tiu ĉi artikolo scivolemas, jen kelkaj ekzemploj: "Ĉu vi konsideras vin mem kiel normala persono?", "Ĉu vi kaj mi vidas la samon kiam ni ambaŭ nomas la ĉielon blua", "Via amik(in)o ĵaluzas kiam vi plezuras kun alia persono?", "Ĉu vi kontraŭas la liberan amon?", "Ĉu necesas ke infanoj iru al lernejo?" kaj la plej grava demando iam ajn "Vi troviĝas en eleganta societo, kaj senintence furzas, ĉu vi hontas pro tio?".

"La Ludo de la Nuda Vero" estas produktaĵo de *at-A-lanta* www.at-A-lanta.nl originale nederlandlingva, tradukita esperantlingven dank' al Marulino Hemelaar kaj Rob Moerbeck.

# Eterne Rima

*recenzis Siru LAINE*

La albumo "Samideano" de pola repisto Eterne Rima estis eldonita de Vinilkosmo ĉi jare. La kovrilo de ĉi tiu KD informas tuj pri kia muziko temas; oni povus kredi ke Eterne Rima venas rekte de la usona Okcidenta Marbordo kun la larĝaj vestoj kaj brila kolĉeno.

En la interna libreto oni povas trovi la vortojn de ĉiuj kantoj kaj ĝi estas laŭ mi tre bone farita, kun ĉarmaj bildoj kaj klaraj tekstoj; oni povus elekti ĉi tiun KD-n nur laŭ la libreto kaj ties moderneco.




Dum la "Prologo", la unua album-kanto, mi ne sciis ĉu la albumo estos serioza aŭ ne, sed jam post la unua kanto mi rimarkis la potencon de ĉi tiu hiphopa artisto.

Eterne Rima kantas – aŭ repas, verdire - pri sufiĉe ĝeneralaj aferoj kiel amo kaj mono, sed ankaŭ pri Esperanto kaj ties parolantoj.

Estas amuze aŭskulti la vortojn ĉar ili estas variaj kaj bonege aranĝitaj ritme kaj rime. La batoj kaj ritmoj estas orelplaĉaj kaj la vortoj rapidaj sed tamen kompreneblaj kaj klare prononcitaj.

Tamen laŭ mi la voĉo ŝanĝita al malalta tembro estas iom komika, same kiel la kantitaj partoj.

Tre saĝa decido de Vinilkosmo estis aldoni senvoĉajn sondosierojn, tiel ke eblas karaokei la tutan albumon kun geamikoj aŭ dum Esperanto-kunvenoj aŭ, kial ne!, nur simple aŭskulti la son-aranĝon kiel fonan muzikon dum oni faras ion tute alian.

Se oni ŝatas hiphopon "Sam-ideano" estas ĝu-ebla albumo.

Tamen homoj kiuj ne tre aŭskultas hiphopan muzikon povas ŝati tiujn ĉi kantojn pro la tekstoj.

Se iam Vinilkosmo okazigus kunlaboron inter la hiphopaj artistoj por aperigi unuecan albumon certe Eterne Rima oportune kontribuus per interesaj tekstoj kaj sonaranĝoj!

Entute aĉetinda KD, aŭskultigu ĝin al viaj (ankoraŭ) neesperantistaj sed hiphopaj amikoj!

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

*TEJO* estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de *UEA, la Universala Esperanto-Asocio*.
TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.
La organizo defendas kulturan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.
TTT-ejo: www.tejo.org

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: oficejo@tejo.org

## Estraro de TEJO

- Gregor HINKER gregor@tejo.org (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
- Oleksandra KOVYAZINA sasxa@tejo.org (Informado, unua Vicprezidanto)
- Paulína KOŽUCHOVÁ paulina@tejo.org (Ĝenerala Sekretario)
- Irmina SZUSTAK irmina@tejo.org (Landa Agado, Vicprezidanto)
- Sergej TYRIN kasisto@tejo.org (Kasisto)
- Łukasz Maciej ŻEBROWSKI lukiz@tejo.org (Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!
Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

**TEJO dankegas vin pro via subteno!**